




共同

话语

# Mikrofone

8-a jaro • Januaro-Marto, 2010





## Redaktora mesaĝo

Estimataj legantoj! Nia kaj ankaŭ via kuriero "Mikrofone" fondita en 2003, ĉiam ricevas fortan subtenon kaj ĝuas vastan ŝaton de legantoj post sia apero.

"Mikrofone" estas jam fenestro, tra kiu viaj vortoj el letero kaj retmesaĝo karesas la okulojn de tutmondaj samideanoj.

Nun la distribua kvanto superas milon kaj centojn da ekzempleroj. En 2007 la kuriero fariĝis gazeto trimonata kaj, en la estonteco eble dumonata dank' al abundiĝo de viaj kontribuajfoj. Ni atendas vian pluan subtenon en la komuna redaktado!

Ja bonvenaj estas ĉiuj kontribuajfoj rilataj al nia disaŭdigo kaj la E-Movado. Ni kune deziru pli prosperan estontecon de nia Mikrofone!


# ENHAVO

- 3** Novjara mesaĝo de ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao
- 4** Nov-jara mesaĝo de Wang Gengnian, direktoro de ĈRI
- 5** Ĉinoj pasigis la Printempan Feston en ĝojo kaj harmonio  
Saluto kaj bondeziroj
- 7** Raporto pri registara laboro skizis disvolvan vojmapon post krizo
- 8** Cititaj artikoloj de la 45-jariĝo de nia E-elsendo
- 12** **Intervjuo**  
Konu denaskan esperantiston Leo Sakaguchi
- 14** Tra la Mondo
- 15** **Mikronovelo**  
Ne Tia "Matureco"

Ŝanhaja Monda Ekspozicio okazos dum la periodo de la 1-a de majo ĝis la 31-a de oktobro. Por ke la publiko per la gepatraj lingvoj vivece kaj detale konu informojn pri la ĉeftemo, pavilonoj kaj aktivadoj de Ŝanhaja Monda Ekspozicio, kaj signifon de la priurba ĉeftemo al la homara vivo, Ĉina Radio Internacia, per sendrata kaj reta disaŭdigoj ekde la 20-a de februaro ĝis la 1-a de aŭgusto, serie elsendos tutmondan scian konkurson titolitan "Renkontiĝo en Ŝanhaja Monda Ekspozicio" kaj bonvenigas vian partoprenon.

Sinjorinoj, sinjoroj, kamaradoj, amikoj,

Baldaŭ sonos la novjara sonorilo, kaj tuj malfermiĝos la kurteno de la jaro 2010. En tiu ĉi bela momento, plena de esperoj, mi tre ĝojas adresi, pere de Ĉina Radio Internacia, Ĉina Centra Popola Radio kaj Ĉina Centra Televid-Stacio, novjaran bondeziron al la tutlanda popolo de ĉiuj naciecoj, al samlandanoj en Hongkong-a Speciala Administra Regiono, Aomen-a Speciala Administra Regiono kaj Taiwan, al transmaraj ĉindevenuloj kaj ĉinaj elmigrintoj kaj al diverslandaj amikoj tra la tuta mondo.



La jaro 2009 estas tre grava en la historio de Ĉina Popola Respubliko. La ĉina popolo de ĉiuj naciecoj solene celebris la 60-an datrevenon de la fondiĝo de nova Ĉinio. Ili sentas nekompareblan fieron por disvolviĝo kaj progreso de la granda patrolando kaj tenas firman decidon, ĉe la nova startpunkto, antaŭenpuŝi plu la socialisman aferon kun ĉinaj trajtoj. Vizaĝe al la serioza bato de la internacia financa krizo, la ĉina popolo de ĉiuj naciecoj, kun firma fido, unuanime kaj spite al malfacilaĵoj persistas preni tenadon de stabila kaj rapida kreskado de ekonomio kiel la ĉefan taskon de ekonomia laboro, kaj laŭplane faras diversajn laborojn, inkluzive de certigo de kreskado, popola feliĉo kaj stabileco, por ke ekonomio ĝenerale releviĝu kaj pliboniĝu. La ĉinaj reformado kaj malfermo kaj socialisma moderniga konstruado gajnas novajn rimarkindajn atingojn, la popola vivo ĉiam pli

boniĝas, kaj la socio restas en harmonio kaj stabileco. Ĉinio aktive aliĝas al internacia kunlaboro por traktado pri la internacia financa krizo, klimata ŝanĝiĝo kaj aliaj problemoj, plivastigas interfludon kaj kunlaboradon kun diversaj landoj, kaj faris novan kontribuon por paco kaj evoluo de la mondo.

La jaro 2010 estas la lasta por plenumi la "dekunuan kvinjaran projekton". En la nova jaro ni alte tenos plu, kun firmeco kaj neŝancebleco, la grandan standardon de socialismo kun ĉinaj trajtoj, prenante kiel orientilojn la gravajn pensojn, kiaj la teorio de Deng Xiaoping kaj la "tri reprezentoj", profunde efektiviĝos kaj plenumos sciencan disvolvan koncepton, tenos kontinuecon kaj stabilecon de politiko pri makroskopa ekonomio, plenumos

al feliĉo de ambaŭbordaj popolanoj.

En la nuna tempo, la mondo restas en granda renovigado kaj granda reguligado. Monda plurpolusiĝo kaj ekonomia tutglobiĝo profunde disvolviĝas, la influo de la internacia financa krizo daŭre manifestiĝas, klimata ŝanĝiĝo, energifontoj, publika sansekureco kaj aliaj tutglobaj problemoj elstarigiĝas, varmaj problemoj internaciaj kaj regionaj sin sekvas. Por akceli plu noblan aferon de homaraj paco kaj evoluo necesas tio, ke diverslandaj popoloj plifortigu kunlaboradon kaj kune marŝu en la sama navigo. Profite de tiu ĉi okazo, mi volantas serioze reaserti, ke Ĉinio tenos plu standardon de paco, evoluo kaj kunlaboro, plenumos la celon de diplomatia politiko en protektado de monda paco kaj akcelado de kuna disvolvo, ĉiam senhezite iros sur la

## Novjara mesaĝo de ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao


plu pozitivan financon politikon kaj moderan lozan monpolitikon, plenforte altigos celecon kaj elastecon de politiko laŭ nova situacio kaj nova stato, pli atente akcelos transformigon de ekonomievolva metodo kaj reguligon de ekonomia strukturo, pli atente antaŭenpuŝos reformadon kaj malfermon kaj memkreadon, plifortigos vigecon kaj movforton de ekonomia kreskado, pli atente plibonigos popolan vivon kaj tenos harmonian kaj stabilecon de socio, pli atente planos pri aferoj enlandaj kaj internaciaj, klopodos realigi stabilan kaj rapidan disvolvon de ekonomio, kaj antaŭenpuŝos procezon por plenamplekse konstrui bonhavan socion. Ni persistos en la orientiloj pri "unu lando kun du socisistemoj", "hongkong-ana administrado super Hongkong", "aomen-ana administrado super Aomen" kaj alta aŭtonomeco, kaj protektos, kun vastaj amasoj de samlandanoj en Hongkong kaj Aomen, longedaŭrajn prosperon kaj stabilecon de Hongkong kaj Aomen. Ni persistos en la orientilo pri "paca reunuigo kaj unu lando kun du socisistemoj", firme tenos la ĉeftemon pri paco kaj evoluo de la dubordaj rilatoj, plifortigos dubordajn interfludon kaj kunlaboradon, kaj pli bone nin dediĉos

vojo de paca disvolvo, ĉiam senhezite praktikos malferman strategion pri reciproka utilo kaj kuna gajno, persistos disvolvi amikan kunlaboron kun ĉiuj landoj surbaze de kvin fundamentaj principoj pri paca kunekzisto, aktive aliĝos plu al internacia kunlaboro por trakti pri la internacia financa krizo, klimata ŝanĝiĝo kaj aliaj problemoj, kune kun diverslandaj popoloj akcelos konstrui harmonian mondon kun longedaŭra paco kaj kuna prospero.

Ĉe tiu ĉi momento, sur la planedo, kie ni kune vivas, ankoraŭ multaj homoj suferas de milito, malriĉo, malsano kaj katastrofo. La ĉina popolo elkore simpatias al ili pro ilia mizero kaj volas helpi ilin laŭ siaj ebloj kiel antaŭe. Mi kredas, ke post senĉesa klopodado de diverslandaj popoloj, monda civilizacio ĉiam disvolviĝos, kaj feliĉo de la homaro ĉiam pliiĝos.

En la jaro 2010, okazos monda fiuro kun la ĉeftemo "Urbo por Pli Bela Vivo" en Ŝanhajo. Ni varme bonvenigas amikojn tra la kvin kontinentoj al la solenaĵo. Ni kune komponu novan ĉapitron por pliigi interkomprenon kaj amikecon!

Fine, en Pekino, mi deziras al vi feliĉon kaj sanon en la nova jaro!



## Nov-jara mesaĝo de Wang Gengnian, direktoro de ĈRI

Karaj amikoj, baldaŭ eksonoros la nov-jara sonorilo por 2010. Nome de la kolegaro de Ĉina Radio Internacia, mi, de Pekino, adresas al vi ĉiuj plej sinceran saluton kaj plej elkorajn bondezirojn! Ĝojan Nov-Jaron! Pacon, feliĉon kaj sanon al vi!

Antaŭ tri monatoj, ĉe jubileo por la nova Ĉinio, Ĉina Radio Internacia komplete raportis la solenon sur Tian'anmen-Placo. Ni ĝoje trovis, ke amikoj el diversaj landoj donis festan bondeziron al nia lando. Germana aŭskultanto Andreas Muecklich diris al ni: "En la pasintaj 60 jaroj, Ĉinio sin turnis de malriĉa lando al potenca lando, kiu gvidas mondan ekonomion. Por ni tio estas surprizo. Cetere tio absolute estas ne fino, sed startpunkto. Aŭskultante vian programeron, mi klare sentas, ke Ĉinio ĉiam klopodas por tio." Tiuj vortoj estas kuraĝigoj de niaj malnovaj amikoj kaj ankaŭ estas iliaj laŭdoj. Ni fieras pri nia patrolando kaj samtempe kortuŝiĝas de niaj amindaj kaj respektindaj aŭskultantoj.

En 2009, Ĉinio bone faris planadon kaj aranĝadon por trakti la finan kan krizon tra la tuta terĝlobo, per tio unue stabiligis kaj revigligis la ekonomion, gajnis evidentan progreson en ekonomia kaj socia disvolvo kaj realigis celon pri ekonomia kreskigo. En la domago de nia radio, videblas jenaj vortoj: ĉina starpunkto, monda vido kaj homa valoro. Tiuj vortoj ĉiam nin inspiras.

En la pasinta jaro, Ĉina Radio Internacia senĉese faris transcendon. Ni ĉiam tenas celon, t.e. pliigo de kompreno kaj amikeco inter la ĉina popolo kaj la monda popolo. Samtempe ni marŝas kun la epoko por pli bone kontentigi postulon de niaj aŭskultantoj. En 2009, pliigis nombro de disaŭdigo per 6 lingvoj kaj nun Ĉina Radio Internacia, farante ĉiutagan disaŭdigon en 59 lingvoj, estas amaskomunikila platformo kun plej multaj lingvospecoj en la mondo. Cetere ni pliigis 14 alilandajn frekvencajn radiojn kaj kapablo por ĉeloka programero-produktado pluapaŝe grandiĝas.

En la nuna ret-epoko, ni aktive praktikas strategian reguligon de funkcia strukturo kaj plifortigas interaktivigon kun aŭskultantoj kaj retanoj. "Rigardo al Ĉinio ĉe landlimoj fare de ĉinaj kaj eksterlandaj raportistoj de ĈRI", "mondskala konkurso", "surreta prijuĝado pri dek internaciaj amikoj de Ĉinio" kaj aliaj eksponas enhavoriĉecon de la marko de Ĉina Radio Internacia. "Surreta dialogo pri voĉo el Urumĉio" konigis al turkoj la veron de "julio-kvina evento" kaj gajnis ilian aplaŭdon. En la riĉrikolta jaro 2009 ni ricevis pli ol 2 milionojn kaj 900 milojn da eksteraj leteroj kaj retmesaĝoj. Nova rekordo!

Karaj amikoj, via subteno kaj atento estas nia movforto kaj via postulo kaj atendo donas al ni forton por kreado. Jam sennombraj aŭskultantoj tenas kun ni nepaligeblan amikecon. Ĉi tie mi, nome dek kolegaro de Ĉina Radio Internacia, esprimas elkoran dankon al vi, niaj aŭskultantoj...

Koran dankon al vi ĉiuj!



## Ĉinoj pasigis la Printempan Feston en ĝojo kaj harmonio

Ĉinoj pasigis la Printempan Feston en ĝojo kaj harmonio

Februare la ĉina popolo renkontis la plej gravan tradician feston – la Printempan Feston de la tigra jaro laŭ la ĉina luna kalendaro. Okaze de la festo, ĉinoj havis sep festotagojn. Ni kredas, ke certe vi per niaj programeroj pli profunde konis la feston kaj kune kun ni dividis la ĝojan etoson. Estontece, se vi havos

ŝancon, bonvole venu al Ĉinio kaj pasigu la feston kune kun ĉinoj. Bonvenon!

Okaze de la festo, eksprezidanto de UEA Renato Corsetti, prezidanto de Vladivostoka E-klubo "Pacifiko" Aleksandr Titajev el Rusio, vicprezidanto de Nepala Esperanto-Asocio Narendra Raj Bhattarai, Albert Reiner el Aŭstrio, Livia Barth el Argentino, Edvaldo Silva

Machado el Brazilo, Jiri Patera kaj Jindřich Tomášek el Ĉeĥio, Tobias MEISSNER el Germanio, geedzoj Marija kaj Branko el Kroatio, kaj multaj aliaj sendis gratulkarton kun bondeziroj. Estas menciinde, ke s-ro Amin Najmi el Maroko sendis bondezirkarton kaj mesaĝon eĉ en la ĉina lingvo. Koran dankon al ĉiuj bondezirantoj!

## Novjaraj bondeziroj

Ĉe la alterno de la jaroj nova kaj malnova, multaj amikoj el diversaj mondpartoj diversmaniere esprimas sincerajn salutojn kaj bondezirojn: Wolmar Campostrini el Brazilo sendis mesaĝon kun bildprezento en Esperanto akompanate de milda muziko por esprimi novjarajn bondezirojn; hungara amiko Turanyi Tereza per karto kun sia propra pentraĵo esprimas al ni novjarajn bondezirojn; Lagutenkov Petroviĉ el Rusio per la ĉina lingvo deziras al ni ĝojan Novjaron kaj esperas, ke la Nova Jaro portu al ni feliĉon kaj

longan vivon!


### Wolf Krüger el Germanio:

Multan dankon pro la ĉiutaga interesa Esperanto-elsendo. Ĝi estas bone aŭdebla sen problemoj pere de vertikala anteno sur la tegmento de la turdomo en 40 m alteco.

Dankon ankaŭ pro la regula sendado de Mikrofone. Mi konservas ĝin ekde numero 1 kaj uzas ĝin por informoj al la esperantistaro.

Por la nova jaro 2010 mi deziras al vi ĉion bonan, ĉefe sanon kaj sukceson.

### Karlo Ĝelozo el Italio:



Dankemo ne nur pro la tutmondaj esperantlingvaj elsendoj de ĈRI, sed ankaŭ pro la des pli impresiga fakto, ke via lando donas ekzemplon al nia planedo pri maniero kiel oni povas iomete pli simple (kaj paceme) ekkreskigi interkomprenon tutgloban, sen meti sin je la sekvo de ununura

etna lingvo, pormomente (eble ne poreterne, ĉu?) regantega mondvasle!

La simplaj kaj senpovaj civitanoj kiel mi, ne havantaj povon por plibonigi nunan tutmondan situacion, krom per humila, pasia persona uzado de Esperanto, vere devas esti feliĉaj. Kiom ege signifoplena decido ( do ankaŭ kuraĝa indiko ) estis, dum la lastaj Pekinaj Olimpikoj, enirigon de la Zamenhofa genia komprenilo inter la 10 oficiale elektitaj lingvoj!

La "homaro" ŝajne antaŭeniras al plia racieco, justeco kaj frateco.

Kvankam mi ne plu tion vidos, tamen mi certas, ke akcepto de internacia, bone planita lingvo disvastiĝos ĝis la venko kaj tiam via agado estos ĉiel memorenda kaj dankegenda!

Feliĉan Novjaron kaj sukcesaron al ĈRI kaj al "Mikrofone"!

#### **Tobias MEISSNER el Germanio:**

Al vi ĉiuj - antaŭ kaj malantaŭ mikrofono - mi deziras ĝojigan Kristnaskon kaj sukcesan kaj ĝojplenan Novan Jaron!

#### **Luit Staghouver el Nederlando:**

Ankaŭ ĉi tiun jaron mi ne vikle korespondis, mi eĉ nur malofte vizitis vian retpaĝon. Ĉu mi tiel malmulte interesiĝas pri via agado? Ne, tute ne. Sed mi daŭre estis okupita pri aliaj, pli urĝaj aferoj, kiuj petis mian atenton kaj pri mia alia ŝatokupo: naturfotado. Bedaŭrinde en tagnokto estas nur 24 horoj.

En Nederlando nun regas vintro. La antaŭan semajnon bela prujno kovris preskaŭ ĉion kaj ĉi tiun semajnon dika tavolo da neĝo (pli ol 30 centimetroj) kaŭzis gravajn trafikajn problemojn, sed samtempe plibeligis la pejzaĝon.

Mi deziras al vi ĉiuj Agrablan

Kristnaskon kaj prosperan, precipe sanan jaron 2010.

#### **Fazel Mondani el Irano:**

Saluton, Karaj amikoj de Esperanto-redakcio de ĈRI. Mi, via amiko, deziras al vi ĉiuj kaj viaj familianoj treega ĝojan Kristnaskon kaj tre feliĉan kaj prosperan Novan Jaron 2010!

#### **Clayton Ricardo Simões Pereira el Brazilo:**

Mi deziras al la tuta ĉina popolo kaj al ĝia efika Ĉina Radio Internacia, multe da prospero, amo, frateco kaj paco!

Mi amas vian landon! Bonvolu, publikigu eron pri la bonzaj luktistoj el Ŝao-Lin. Mi trovas, ke tio estas interesa al ĉiuj amantoj de uŝuo.

#### **Leopold PATEK el Aŭstrio:**

Amikajn salutojn al ĉiuj anoj de la Esperanto-Sekcio!

Ĉe la sojlo al la nova jaro 2010, mi esprimas sincerajn bondezirojn al vi. Mi esperas, ke la jaro 2010 portos al vi kaj viaj familianoj feliĉon, sanon kaj prosperon.

#### **Iván Mättig Catalán, UEA-Delegito en Santiago de Ĉilio:**

" La Nova Jar' "

La nova jar', la nova jar',

La homojn plibonigas.

Sur ĉiu strat', en ĉiu dom',

Afabla estas ĉiu hom'.

La nova jar', la nova jar',

La homojn afabligas.

Ho nova jar', mi amas vin,

Pro via dolĉa paco!

Sed diru, ĉu sincere vi

Tutsola sorĉas ĉion ĉi,

Aŭ ĉu faras multe pli

Nur la novjar-donaco?

Kun plej bonaj deziroj por vi kaj viaj familianoj dum la tuta jaro 2010!

**Prof. Vjeĉeslav Hromov el**

#### **Estonio:**

Tutkore mi dankas al vi pro viaj interesaj elsendoj kaj mi studas la ĉinan lingvon pere de via bone aŭdebla Radio. Mi deziras al vi sukcesojn en la nova jaro. Estu ĝi paca kaj feliĉa!

Saluton kaj bondezirojn sendis ankaŭ Abel Weiner el Argentino, Afschrift Antoon, Marc Cuffez kaj Jean Pierre Van den Daele el Belgio, Jose Pardal da Silva Brazilo, Angel Ivanov Maglov kaj Cveta Popova el Bulgario, inĝeniero Frantisek Havlik kaj Helena Maudrova el Ĉeĥio, Aaron Tiu el Filipinoj, Jorma Toropainen el Finnlando, Alain Chalm kaj Robert Pontnau el Francio, Anton Kronshage el Germanio, Barkanyi Istvan kaj Tetreza Turanyi el Hungario, Fazel Mondani el Irano, Hideki Harada, Takezaki Mucko kaj Iĉimuro Ŝiroo el Japanio, Guido Hernandez el Kosta-Riko, Marija kaj Branko Repac el Kroatio, Mila el Nederlando Jawaid Eahsan el Pakistano, Mariusz Domaszewicz, Vrszyla Mokrzycka, Marian Laba, Zbigniew Stepinski kaj Jerzy Dryja el Pollando, Marian Vochin el Rumanio, Vjaĉeslav Suslov el Rusio, Milorad Djurdjeviĉ el Serbio, Lars Westman el Svedio kaj Anatoli Ionesov el Respubliko Uzbekistano kaj multaj aliaj.

Koran dankon al ĉiuj, kiuj sendis novjarajn saluton kaj bondezirojn!



## Raporto pri registara laboro skizis disvolvan vojmapon post krizo



La 5-an de marto en Pekino inaŭguriĝis jarsesio de la Tutlanda Popola Kongreso, la plej alta organo de la ŝtata regpotenco. Ĉefministro Wen Jiabao faris raporton pri registara laboro al ĉirkaŭ 3 000 reprezentantoj de la Tutlanda Popola Kongreso. Pasintajare Ĉinio sukcese liberiĝis el la internacia financa krizo kaj la unua realigis la ekonomian revigliĝon, kaj nun tiu ĉi raporto klare skizis la disvolvan vojmapon de Ĉinio post la internacia financa krizo. La raporto respondis demandojn pri domprezo, enspezo, sanprotektita servo k.t.p., plej atentatajn de la ĉina publiko, kaj elmetis konkretajn rimedojn por solvi ilin.

La raporto difinis la ĉefan taskon de la registaro en tiu ĉi jaro: efektiviĝi makroskopan reguligon, stabile kaj relative rapide kreskigi plu la ekonomion, intensigi ŝanĝon de la ekonomi-disvolva maniero kaj rearanĝon de la ekonomia strukturo, plibonigi la popolan vivtenon kaj akceli socian harmonion. Ĝi reflektas la decidemon de la ĉina registaro kuraĝe alfronti defiojn kaj solvi problemojn.

Malgraŭ multaj necertecoj kaj malfaciloj la ĉina registaro estas tre memfida pri la ekonomia kresko en la kuranta jaro kaj difinis la celon: la malneta enlanda produkto kresku je ĉirkaŭ 8%, la urba registrita

senlaboreco kalkuliĝu al sub 4,6%, kaj la konsuma prezindico altiĝu ĉirkaŭ 3%. Pri tiu ĉi celo Wen Jiabao diris: "Mi devas fari iom da klarigo pri la celo. Kreskigante la malnetan enlandan produkton je ĉirkaŭ 8%, ni devas atenti la efikon, tio estas, ke ni turnu gravecon de diversaj laboroj al ŝanĝo de la ekonomi-disvolva maniero kaj rearanĝo de la ekonomia strukturo."

Por atingi la ekonomi-disvolvan celon Wen Jiabao elmetis en la raporto plurajn rimedojn, ekzemple apliki plu pozitivan financ-politikon kaj konvene malstrikte monpolitikon, ekspansiigi konsuman postuladon de la loĝantaro, intensigi ŝanĝon de la ekonomi-disvolva maniero, rearanĝi kaj optimumi la ekonomian strukturon, konkordigi la ekonomian disvolvon en diversaj regionoj, kaj fari tutecan planon pri urbanizado kaj konstruado de la nova kamparo.

Por altigi la kvaliton kaj nivelon de la ekonomia disvolvo Wen Jiabao alvokis en la raporto, ke oni kulturu novajn strategiajn industriojn, plenforte disvolvu industriajn sektorojn pri novaj energioj kaj materialoj, mediprotekto, energiŝparo, biomedicino, informa teknologio kaj pintklasa manufakturado.

Laŭ enketo de pluraj prestiĝaj retejoj domprezo estas la plej atentata temo. En la lasta jaro loĝdomoj senĉese

prezaltiĝis, kaj la kresko atingis la rekordon. La publiko arde atendas, ke la registaro prenu rimedojn por konvenigi la prezon. Wen Jiabao diris en la raporto: "Ni devas rezolute malhelpi tro rapidan altigon de domprezo en iuj urboj por kontentigi la fundamentan loĝpostulon. Unue, ni efektiviĝu plu grandskalan loĝigan projekton; due, subtenu al loĝantoj aĉeti domojn por propra loĝado; trie, subpremu spekuladon; kaj kvare, plenforte reguligu la dombienan merkaton."

Por garantii kontinuan kaj sanan disvolviĝon de la ekonomio kaj socio Wen Jiabao elmetis en la raporto postulojn daŭrigi la reformadon kaj malfermon, intensigi kulturan disvolvon, plifortigi la batalon kontraŭ korupto, kaj efektive garantii demokratiajn rajtojn de la popolo. Li diris "Oni devas meti la laboron kontraŭ korupto sur gravan lokon, pliigi kontrolon al la administra potenco, kaj praktiki sistemon de la publikigo de registaraj aferoj. Ni devas krei kondiĉojn por ke popolanoj kritiku kaj kontrolu la registaron, kaj ludigi al amaskomunikiloj la kontrolan rolon por ke la potenco funkcii en la suno."



# Cititaj artikoloj de la 45-jariĝo de nia E-elsendo

**Albert Reiner el**

**Aŭstrio:**

“Tutkoran gratulon okaze de la 45-jariĝo de via elsendo. Via elsendo fariĝis aldona fenestro al la mondo kaj alportas pli da lumo, pli da kunligeo kun la mondo kaj donas specifajn kaj alifacetajn bildojn. La ofteco de mia aŭskulto de viaj elsendoj akompanas min preskaŭ ekde la komenco de mia serioza okupiĝo pri nia lingvo.

“Mi ankoraŭ memoras sukcesan kapton de viaj elsendoj el fora lando en malgranda restadejo sur altaj montoj. Rigardante la pasintan tempon, aparte elstaras via longtempa elsendo ĝis la nuna amplekso de unuhora tage. Mi esperas ĝisvivi vian 100-jariĝon.”

**Heinrich Reiter-Kocher el Aŭstrio:**

“Mi kaj mia edzino ambaŭ estas 79-jaraj. Bonvole akceptu nian tre koran dankon pro via elsendo en Esperanto! Mi ĵus finlegis la libron “Elektitaj Verkoj” de Mao Zedong, volumon 3. pri kelkaj problemoj rilatantaj pri gvidado.”

Artikolo de **Angel Ivanov Maglov el Bulgario:**

“Sendube la 45-jariĝo de la E-elsendo de ĈRI estas granda festo de la tuta esperantistaro. Ĉar dum tiu ĉi tempo, via Redakcio sendis novaĵojn, raportaĵojn kaj diversajn informojn pri Ĉinio kaj preskaŭ ĉiujn okazintaĵojn de la tuta mondo. Dank’ al ĉio ĉi nia granda E-familio havas eblecon rapide scii per via Radio ĝustan informon de ĉiuj gravaj eventoj.



“Samtempe <Mikrofone> estas grava faktoro en nia Esperanto-kampo. Nun le revuo (Mikrofone) estas bela kaj perfekta kun abundaj informoj kaj fotoj.

“Ĉi-jare via lando havas du gravajn ĝojaferojn: La 60-a datreveno de la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko kaj 45-jariĝo de via E-elsendo. Vi devas esti fieraj kaj ĝojaj, ĉar via lando multe progresis en mallonga tempo. Mi, kiel emerita fervojisto, estas profunde impresita de viaj gravaj sukcesoj, kiel ekzemple nun vi konstruas altrapidan magnetfervojon de Ŝanhajo ĝis Pekino longan je 1 100 kilometroj kun rapideco je ĉirkaŭ 300 kilometroj pohore. Tio estas ne pripensebla en Bulgario. Mi deziras al vi kaj al la obstina ĉina popolo feliĉajn datrevenojn!”

**Wolfgang Bienen el Germanio:**

“Mi ofte aŭskultas viajn elsendojn, post kiam mi vizitis vian Redakcion en 1995. Mi bondeziras al via tuta teamo

pluajn sukcesojn en la estontaj jaroj!”

**Adalbert Masuhr el**

**Germanio:**

“Mi gratulas vin pro la 45-jariĝo de la E-elsendo de ĈRI! Tre rapide pasas la tempo. Kvankam mi baldaŭ estos 77-jaraĝulo, tamen mi ankoraŭ bone memoras la komencajn jarojn pri aŭskultado de via tre interesa elsendo. Nun via elsendo estas la sola, kiun mi povas aŭskulti. Interesa kaj enhavoriĉa Mikrofone, kiu donas al

mi multe da informoj pri gesamideanoj de la mondo, ege ĝojigis min.

“Mi decidis aŭskulti vian elsendon en mia tuta vivo.”

**Algimantas Piliponis el Litovio:**

“Bedaŭrinde mi ne povas kapti viajn elsendojn. Sed mi vin salutas kaj gratulas vin pro via aktivado unuigi per Espeanto la mondon plenan de konfliktoj. Kun granda ĝojo mi regule ricevas Mikrofone kaj multe informiĝas pri Ĉinio, kiu estas bona ekzemplo por malgranda Litovio ĉe Balta Maro. Mi estas feliĉa flanke ĉe vi!”

**Kazimierz Krzyzak el Pollando:**

“Mia kontakto kun via Redakcio daŭras nur 15 jarojn. Mi admiras vian antikvan kulturon kaj estas simpatiulo al Ĉinio. Mi estas plena de respekto kaj estimo al la saĝa kaj laborema ĉina popolo, kiu precipe en la lastaj jaroj efektivigis grandan reformadon de la ekonomio kaj modernigon de la lando.

“Ĉinio havas egan ŝancon por



proksima estonteco resti la plej grava potenco de la mondo.

“Mi pensas, ke ĉinoj perfekte scias, ke bela, antikva kaj artista ĉina lingvo estas tro malfacila, precipe en skribado por servi al la monda interkompreniĝo. Estas evidente, ke Esperanto estas volonte akceptata de multaj. Mi pensas, ke nur Ĉinio, kiel eminenta monda potenco, havas la kapablon akceli Esperanton fariĝi la dua nacia lingvo en la monda interkompreniĝo kaj kunigi homojn de la tuta mondo. Grandegan rolon ludas la E-Redakcio de ĈRI en tiu efektivigado.”

**Vrszula Mokrzycka el Pollando:**

“Kiam mi komencis aŭskulti E-elsendon de Ĉina Radio Internacia, mi ne supozis, ke tia ĉarma kontaktado daŭras tiel longe. Rapide ŝanĝiĝas la situacio en via lando kaj la mia. El multaj gazetoj, prospektoj kaj donacoj, alsenditaj de vi, mi sciis pri la socia vivo, kulturo, ekonomio kaj tradicio de Ĉinio en ekstrema Oriento. Plej grava okazintaĵo estas Pekinaj Olimpikoj. Sportistoj, trejnistoj, raportistoj kaj turistoj el la tuta mondo venis al Pekino. Per viaj Mikrofone kaj retpaĝo mi spertis diversajn interesajn kaj neforgeseblajn momentojn de la Olimpikoj.

“Mi deziras al Redakcio de ĈRI multajn sukcesojn kaj prosperon en la laboro.”

**Alice Amalia Klein el Brazilo:**

“Saluton, miaj tre karaj fratoj ĉinaj.

“Elkorajn bondezirojn al vi pro via bonega laboro, kiu ĉiu-tage envenas en mian hejmon pere de via elsendo al Brazilo. Mi estas tre feliĉa, ke ĉiu-tage ĈRI-anoj parolas kun mi en la hejmo.

“Esperanto estas grava konsistiga parto de mia vivo. Antaŭe mi korespondis kun neniuj pro okupiteco. Poste mi lernis Esperanton kaj dank’ al ĈRI mi korespondas kun multaj samideanoj

de multaj landoj kaj aliĝis en la monda Esperantujo.”

**George Otto Vaske el Brazilo:**

“Okaze de la elstara evento de la 45-jariĝo de via E-elsendo, Ĉinio rajtas fieri pro sia kontinua propono al la mondo per kontraŭstaro al la lingva hegemonio por valorigi la naciajn lingvojn kaj kulturojn.

“Miaflanke mi kontentas teni longjarajn kontaktojn per elsendo de raportoj el sudameriko en kvar sezonoj de la jaroj. Mi tre dankas la ĉinan regiataron pro la valora subteno al Esperanto kaj deziras, ke ĈRI ekzistu centoble longe, fekunde semante fratigajn mesaĝojn al ĉiuj kontinentoj!”

**Barkanyi Istvan el Hungario:**

“Kiam mi komencis lerni Esperanton, mi ankoraŭ ne povis kapti viajn elsendojn. Nur ĉirkaŭ 1992 estas la jaro, en kiu mi povis aŭskulti vian E-elsendon kaj korekti miajn prononcojn. De tiam mi ne ĉiam, sed ofte aŭkultas viajn elsendojn. Mi ne interesiĝas pri politiko kaj multe atentigas kulturajn aferojn de Ĉinio.

“Mi esperas, ke vi daŭrigu vian noblan laboron, elsendu multajn interesajn raportojn pri ĉina kulturo nuna kaj antikva.”

**Janos Petik el Hungario:**

“Mi gratulas vin pro la 45-jariĝo de via E-elsendo!”

“Laŭ mi viaj elsendoj estas la plej atentataj fontoj pri okazintaĵoj de via granda lando, ĉar la burĝa amasmedio, ankaŭ en mia lando, peradas la informojn el Ĉinio, taŭgajn nur por politika bezono.”

**Marian Laba el Pollando:**

“Okaze de 45-jariĝo de E-elsendo mi sendas antaŭgratulon kaj dankon pro viaj elstaraj laboroj dum la pasintaj jaroj. La E-elsendo estas la sola ĉiu-taga E-elsendo nun en la mondo kaj pluan fruktodonan laboron por nia E-Movado.”

**Anton Kronshage el Germanio:**

“‘Mi kaj la 45-jara E-elsendo’ unue instigas min gratuli kaj deziri al E-sekcio de ĈRI bonan vojon al la 50-jariĝo! Dum pli ol 50 jaroj, la ĉefa tasko de nia E-Grupo de Schwelm estas informi kaj praktiki Esperanton. La plenumado kaj efektivigado de tiu ĉi tasko okazis ankaŭ per kontakto kun Ĉinio. La grupanoj regule kunvenas kaj utiligas diversajn eblecojn propagandi Esperanton kaj ĉi-flanke via E-elsendo ludis aktivan rolon.”

**Wolmar Campostrini el Brazilo esprimis:**

“En 2004 vi memorigis la 40-an jariĝon de via elsendo. Mi partoprenis kaj gajnis T-ĉemizon, kiun mi fiere multfoje uzas, kaj la edzino montras ĝin al amikinoj, kiuj miras gape pro la distanco inter ni kaj pro la afero. Mi uzas ĝin kaj gardas zorge.

“Nun en la 45-a jariĝo mi gratulas vin pro la laborado persista, kaj profitante mi sugestas vin, per la potenco de via disaŭdigo, proponi al Brazilo, Rusio, Hindio kaj Ĉinio adopti Esperanton kiel komunikilon inter ili. Ĉi tio estus gravega kaj kortuŝanta konkero por ĉiuj esperantistoj kaj por la Mondo.”

**Davudov Megomed el Azerbajĝano:**

“Mi antaŭgratulas vin okaze de la 45-jariĝo de via E-elsendo. Via E-elsendo estas ege bezonata de la homaro kaj mi deziras al vi grandajn sukcesojn.”

**Alain Chalm el Francio:**

“La sukceso de la angla estas falsa. Kiam oni scios, ke Esperanto estas logika, scienca, facile lernebla kaj multe ŝpariga, do ĝi ĝuos pli da avantaĝoj.

“Mi lernis la anglan kvin jarojn en lernejo kaj poste tri jarojn sekvis vesperajn kursojn, kaj mi ne kalkulis la privatajn kursojn pagitajn de miaj gepatroj. Rezulte estas tio, kiel nia vilaĝestro mi duone legas kaj balbutas

antaŭ la angloparolantoj kaj diskuti kun angloj estas terure malfacile. Persone mi lernis Esperanton sola, sen iu helpo krom libroj kaj diskoj kaj post du jaroj mi bone komprenis la radioelsendojn de tiu epoko, Pekino, Varsovio kaj aliaj. Nun restas nur Ĉina Radio Internacia, kiun mi aŭskultas unu horon preskaŭ ĉiu-tage je 7265 kHz kaj sendas du aŭ tri raportojn po monate, ĉar aliaj malaperis grandparte pro manko de reagoj de la aŭskultantoj.

“La esperantistoj ne komprenis la valoron de la E-elsendoj de ĈRI kaj aliaj, pagitaj de la instancoj de la landoj, kaj neglektas tiujn gravajn al ili senpage donitajn. Tiuj elsendoj multe helpas al unuecigo de la prononcado de la lingvo, kiun oni ne povas trovi en la libroj kaj gazetoj.”

#### **Lars Westman el Svedio:**

“Mi kaptas la okazon por gratuli vian belan jubileon! Mi alte taksas vian gazeton kaj kompreneble ankaŭ viajn radio-elsendojn. Dank’ al viaj elsendoj kaj Mikrofone mi estas bone informita pri via granda, interesa lando. Koran dankon pro via 45-jara, lerta radio-laboro, kiu havigis al aŭskultantoj vere aŭskultindajn programojn. Krom diversaj novaĵoj ni ekhavas ankaŭ bonan bildon de la vivo en tiu granda lando – pli kaj pli grava nacio en la mondo.”

#### **Arno Jose Volamr el Brazilo:**

“El Ĉinio al la mondo! Viaj oraj voĉoj ni kun ĝojo aŭskultas kaj reaŭskultas. De longe mi aŭskultas viajn elsendojn kaj legas artikolojn pri Ĉinio en Mikrofone. Mi surbendigas la elsendojn kaj foje refoje aŭskultas. Nun mi kaj aliaj brazilaj esperantistoj-aŭskultantoj jam plej bone konas vian grandan landon.

“Ĉinio brilas ĉiam pli kaj pli en la nuna mondo per siaj kulturo, saĝo kaj ĉiu-flankaj sukcesoj. Varman gratulon pro via elstara laboro en la pasintaj 45 jaroj

por krei pacan ponton inter la popoloj!”

#### **Jan Klocek el Pollando:**

“Antaŭ 45 jaroj, kiam ĈRI komencis elsendon en Esperanto mi edziĝis. Esperanton mi lernis dum studado en Universitato de Mikolao Kopernik kaj fariĝis prezidanto de la E-Klubo Studenta.

“En 1961 mi finis la studadon kronitan per diplomo de magistro pri matematiko. Dum mia studado mi partoprenis en la 44-a UK en Varsovio kaj aŭskultis E-elsendojn de ĈRI, kiu sendis al mi donacetojn pro la artikoloj de pasintaj jubileoj. Nun mi regule ricevas Mikrofone.

“Mi estas 71-jara avo kaj havas 4 gefilojn kaj 5 nepojn. Mi esperas vivi ĝis post 2014. Ĉar kiam via Redakcio celebros la 50-jariĝon de E-elsendo, ĝuste estos ora jubileo de mia edziĝo.”

#### **Vladimir Popov el Bulgario:**

“Mi gratulas vin okaze de la 45-jariĝo de la E-elsendo de ĈRI! Kvankam fizike mi ne havas la eblecon aŭskulti vian elsendon, tamen mi ĉiam kun granda plezuro legas vian belegan interesan Mikrofone, kiu estas grava fenestro por koni vian grandan landon kaj la E-Movadon ĉinan kaj la mondan.”

#### **Jorma Toropainen el Finnlando:**

“Mi kore gratulas E-Redakcion de ĈRI pro la 45-jariĝo de la E-elsendo!

“Persone mi memoras la 70-jardekon, kiam mi lernis Esperanton kaj scivoleme serĉis radiostaciojn, kiuj faris E-elsendojn. La plej malproksimaj Esperantaj radio-ondoj venis al mi el Ĉinio. Kompare al aliaj stacioj, tiu elsendo estis interesa pro tio, ke ĉinoj mem rakontis pri sia lando kaj popolo kaj samtempe mi povis studi plu Esperanton aŭskultante. Kiel ĉiuj bonaj aferoj, tiu E-elsendo ege evoluis dum 45 jaroj. Tiom mi volas emfazi, ke tutan tempon la prononcado kaj esprimmaniero de la redaktoroj estas vere

bonaj kaj klaraj. Tio estas grava, precipe tiam, kiam la aŭdebleco ne estas sufiĉe bona.

“Estis unu grava kaŭzo, dank’ al tiu elsendo mi partoprenis en la UK en Pekino en 1986. Dum rondvojaĝo de la Kongreso, mi povis konatiĝi kun la lando. Plej pozitive impresis min la afableco de la homoj kaj la ĉina naturo.

“Ĝojigis min, ke Ĉina Radio Internacia daŭre elsendas la valoran lingvon kaj mi dankas pro la elsendo kaj deziras pluan sukceson de tiu laboro!”

#### **Marjet Erasmus-van Zadelhoff el Nederlando:**

“Estis en 1986 kiam mi konatiĝis kun Esperanto-elsendoj, post partopreno al UK en Pekino, mia unua UK, kiu forte impresis min. Reveninte hejmen, mi aĉetis specialan radio-aparaton por kapti la elsendojn. Pli poste mia edzo Hans partoprenis al la Pacifika Kongreso en Qingdao, 1993. Ankaŭ li por la unua fojo konatiĝis kun Ĉinio pere de Esperanto. Ni ambaŭ multe fanfaronis pri niaj ĉinaj E-kontaktoj kaj tio multe helpis al disvastigo de Esperanto.

“Pro diversaj kialoj la aŭskultado de radio-elsendoj iomete stagnis, sed pro la regula ricevo de Mikrofone ni daŭre restas ligitaj al Ĉinio kaj per interreto espereble baldaŭ ni sukcesos kapti la elsendojn pli bone aŭdeblajn ol per nia radio-aparato.

“La 45-jariĝo de via elsendo meritas gratulojn! Ni admiras vian senlacan laboron kaj kore gratulas la 45-jaran filon de ĈRI!”

#### **K. Donker el Nederlando:**

“Mi, 77-jaraĝa instruisto de la lingvoj franca kaj angla gratulas vin pro la 45-jariĝo de via E-elsendo! Koran dankon pro la interesa Mikrofone. Por sekvi rapidan evoluon de via lando mi daŭre aŭskultos vin trifoje semajne.”

## Okazis forta tertremo en Haitio

Matene de la 13-a de januaro laŭ la pekina tempo, okazis en Haitio 7,3-grad tertremo, kiu kaŭzis morton de 8 ĉinaj pacprotektaj policanoj en Haitio. La ĉinaj registaro kaj popolo, kiuj spertis fortan tertremon en Sichuan-provinco en sudokcidenta Ĉinio, rapide montris internacian humanisman spiriton al la savado. Post la tertremo Ĉinio en la unua momento liveris monon kaj materialojn al Haitio. En la 17-a de januaro laŭ la loka tempo, la unua kvanto da kontraŭisismaj kaj savaj materialoj donitaj de Ĉinio atingis Portoprincon.

La ĉina internacia savtaĉmento tuj atingis Portoprincon en la 14-a kaj komencis sian savadon. En la 22-a de januaro, Ĉinio sendis 40-homan grupon, konsistantan el kuracistoj kaj administrantoj de Ĉina Popola Liberiga Armeo, al Haitio por plenumi la taskon de humanisma helpado.

La 16-an de januaro Ĉinio liveris financan kaj materialan helpon al

Haitio, inkluzive de urĝe bezonataj medikamentoj, tendoj, nutraĵoj, trinkakvo kaj vestoj. La duan tagon post la tertremo, Ĉina Ruĝkruca Societo decidis liveri helpon je miliono da usonaj dolaroj.

La 26-an de januaro, Ĉinio liveris monkontribuon je 2,6 milionoj da usonaj dolaroj por helpi Haition. En la sama tago, la dua grupo da ĉinaj helpmaterialoj

ektransportiĝis de Pekino al la flughaveno de Portoprinco, ĉefurbo de Haitio. La helpmaterialoj pezas ĉirkaŭ 65 tunojn, kaj inter ili estas 400 porteblaj generatoroj, 10 akvopurigaj aparatoj, 500 tendoj, 20 000 vestoj kaj multaj kestoj da medikamentoj.

La rapida kaj alte efika savgado de Ĉinio estas alte taksita de UN.



## Okazis 8,8-grad tertremo en Ĉilio

La 27-an de februaro ĉilia ministro pri internaj aferoj Edmundo Perez Yoma diris, ke tertremo de 8,8 gradoj, kiu okazis frumatene de tiu ĉi tago, mortigis almenaŭ 214 homojn.

Laŭ la unua statistiko de la ĉilia registaro, la tertremo damaĝis 8 regionojn de la lando kun la areo de kelkmil kvadrataj kilometroj, kaj plej grave difektita estas Concepcion, ĉefurbo de la ŝtato Bio Bio, la dua granda urbo de Ĉilio, tre proksima al la epicentro.

Cunamo, kaŭzita de la tertremo,

grave detruis sudajn insulojn de Ĉilio. Antaŭaverto de la cunamo jam etendiĝis al mezamerikaj kaj pacifikaj landoj.

Frumatene de la 27-a de februaro laŭ la loka tempo sonis alarmo en Honoluluo, ĉefurbo de Havajio. La loka registaro avertis la loĝantaron, ke tagmeze alvenos cunamo kaŭzita de la tertremo, kaj postulis, ke oni evakuu malaltajn kaj valecajn lokojn ĉe la maro al la landinterno.

La 1-an de ĉina marto, Yao Jian, proparolanto de la ministerio pri komerco,

diris, ke la ĉina registaro decidis liveri al la ĉilia registaro monhelpon de miliono da usonaj dolaroj por ĝia savado. La ĉina registaro liveros diversmanieran humanisman helpon laŭ bezono de la regionoj plagitaj de la tertremo.





# Konu denaskan esperantiston Leo Sakaguchi

Denaskaj esperantistoj ĉiam havas evidentan avantaĝon paroli nian lingvon Esperanto kaj elparolas la lingvon nature kaj flue. Hodiaŭ ni prezentos al vi 22-jaran denaskulon Leo Sakaguchi, kiu naskiĝis en esperantista familio kaj nuntempe loĝas en Germanio kune kun la familio. Jen li rakontas pri sia vivo kiel denaskulo.



Leo: Mi nomiĝas Leo Sakaguchi, nuntempe loĝas en Germanio kaj ankaŭ studas tie mekanikan inĝenieradon. Mia patro Takashi Sakaguchi estas japano, patrino Alicia Sakaguchi, polino, kaj mi havas pliaĝan fraton Dai Sakaguchi. Mi naskiĝis kaj kreskis en Germanio. Kun mia patro mi parolas nur Esperanton depost mia naskiĝo, do tiel mi kreskis kiel denaska esperantisto. Kun mia patrino mi nur parolas la polan, kun mia frato la germanan kaj mi regas la anglan lingvon pere de lernejo.

**Mikrofone:** Vi lerte parolas Esperanton, la polan, la germanan kaj la anglan. Do kiam vi parolis kun malsamaj homoj, vi devas elekti iun lingvon rapide.

Leo: Mi tute ne bezonas pensi se mi ŝanĝas la germanan, polan kaj Esperanton. Ĉar mi ĉiujn lingvojn ĉiu-tage uzas kaj mi tute ne rimarkas ke mi ŝanĝas la lingvon. Ofte ankaŭ homoj demandas min en kiu lingvo mi pensas. La respondo estas, ke loĝante en Germanio, kaj plejparte uzante la germanan, mi plej ofte pensas en la germana. Tamen se mi longe estas en iu Esperanto-renkontiĝo, eble mi komencas pensi ankaŭ en Esperanto.

**Mikrofone:** Vi naskiĝis en familio de esperantistoj. Do viaj gepatroj certe konas unu la alian per Esperanto, ĉu ne?

Leo: Jes, ili lernis Esperanton kaj korespondadis unu kun la alia kaj finfine geedziĝis. Mia patrino lernis Esperanton en loka grupo en Szczecin kie ŝi naskiĝis kaj poste studis Esperantologion en Budapeŝto. Mia patrino verkis diversajn librojn pri interlingvistiko, ĉar ŝi mem estas interlingvistino.

**Mikrofone:** Ĉu ankaŭ vi interesiĝas pri verkado de libroj?

Leo: Fakte ĝis nun ankoraŭ tute ne. Ĉar mi studas mekanikan inĝenieradon, do pri lingvoscienco mi vere ne interesiĝas. Mia patro ankaŭ estas mekanika inĝeniero. Tiel do mi sekvis vojon de mia patro, ne de mia patrino.

**Mikrofone:** Vi estas denaska esperantisto. Ĉu viaj amikoj scias pri Esperanto? Kaj ĉu ili sentas strange, ke vi parolas tian lingvon post via naskiĝo?

Leo: Fakte por mi Esperanto estas tute normala afero kaj mi ne sentis ion nenormalan. Do en la lernejo mi tute ne rimarkis pri tio. Kvankam miaj gekolegoj miris, ke mi parolas malsaman lingvon, tamen ili vere ne sciis kio estas Esperanto kaj ili simple pensis, “ah, li estas iu eksterlandano kaj parolas alian lingvon”. Hodiaŭ mi rakontas al miaj geamikoj pri Esperanto.

**Mikrofone:** Ĉu vi intencis iom instrui al ili Esperanton?

Leo: Jes. Mi fondis lokan grupon en nia vilaĝo kaj kelkfoje instruis Esperanton. Sed kiel denaska esperantisto, mia eblo instrui la lingvon estas ne tro bona. Ĉar mi ne scias kiel la gramatiko estas konstruata. Ĉar mi neniam vere lernis la lingvon. Mi simple povis paroli ĝin. Ofte iuj homoj demandis min kiam mi lernis Esperanton. Mi respondis, ke mi lernis Esperanton en 1987 en mia naskiĝjaro. Kompreneble miaj gepatroj neniam faris kurson por mi, kio estas gramatikaj enhavoj en Esperanto. Ĉar tio fakte estas tute superflua, se oni simple povas regi la lingvon. Kaj miaj gepatroj neniam volis enŝovi nin en Esperanto-movadon, sed nur parolis Esperanton kun ni kaj atentis ĝis ni (mi kaj mia frato), en certa aĝo mem povu decidi ĉu ni volas komuniki en Esperanto kun aliaj homoj aŭ ne.

### Mikrofone: Kion vi kaj via frato elektis? Aktivi en Esperanto-movado aŭ ne?

Leo: Mia frato decidis ne aktivi en Esperanto-movado. Tamen mi jes. Por mi estas interese paroli kun junuloj de la tuta mondo. Kaj ekkoni novajn homojn. Kaj dumvojaĝe viziti tieajn amikojn kaj tiel plu. Fakte estis antaŭ preskaŭ 5 jaroj, kiam mi komencis aktivi. Antaŭe por mi Esperanto nur estis lingvo por komuniki kun mia patro. Antaŭ 5 jaroj mi ekkonis junajn esperantistojn en Germanio kaj mi ekkomencis aktivi kaj ekkoni mem esperantistojn en la tuta mondo. Nuntempe mi estas estrarano de la Germana Esperanto-Junularo kaj aktivas pri kelkaj renkontiĝoj sed ankaŭ pri la kaso. Ekzemple mi organizas renkontiĝojn en Germanio, kiu nomiĝas KEKSO, kaj ĝi estas speciala renkontiĝo por junuloj inter 15 kaj 25 jaroj. Ĝi ankaŭ estas kurso por germanaj junuloj, kiuj tute ne parolas Esperanton.

### Mikrofone: Kiel estrarano de Germana Esperanto-Junularo, ĉu vi povas konigi al ni, kiom da membroj troviĝas en la asocio kaj kiom ofte vi organizas aktivadojn de Esperanto?

Leo: La Germana Esperanto-Junularo havas ĉirkaŭ 4000 simbolajn membrojn kaj ĉirkaŭ 200 ordinarajn membrojn. Tiuj, pagantaj la membrotizojn, ricevas revuojn kaj regule partoprenas en aktivadoj. Por Germanio do indas esti ano de Germana Esperanto-Junularo. Ĉar la ŝtato subvencias la Asocion kaj tiel ekzemple la anoj ricevas vojaĝkost-subvenciojn por internaciaj renkontiĝoj. Ekzemple, estis antaŭ tri jaroj la Internacia Junulara Kongreso okazis en Vjetnamio, niaj partoprenantoj ricevis grandan subvencion.

Do tiu renkontiĝo, pri kiu mi ĵus parolis, KEKSO okazas dufoje jare, aŭtune kaj printempe. Tamen ankaŭ okazas aliaj aktivadoj kaj junularaj renkontiĝoj en Germanio. Estas unu granda kiu nomiĝas Junulara E-semajno. Tio estas kunorganizata kun la Pola Esperanto-Junularo. Kaj ĝi okazas unufoje jare kaj estas sufiĉe granda internacia junulara renkontiĝo. Plej ofte ĝi havas 200 ĝis 300 partoprenantojn el minimume 20 ĝis 30 diversaj landoj.

### Mikrofone: Al kiom da landoj vi jam vojaĝis? Kaj dum via vojaĝo, ĉu vi ofte partoprenas en lokaj aktivadoj de Esperanto?

Leo: Mi vojaĝis al multaj diversaj aziaj landoj kaj Eŭropo, ĉirkaŭ 20 landoj. Se mi estas eksterlande, mi ankaŭ provas laŭeble tiam vojaĝi aŭ tien vojaĝi kie okazas specialaj eventoj aŭ renkontiĝoj. Mi ankaŭ ofte prelegis, ekzemple en Japanio, en lernejoj aŭ universitatoj pri Esperanto. Ĉar ofte okazas Esperanto-kursoj, kiuj organizatas de esperantistoj kaj ili tial invitas min por prelegi. Por mi ĉiam estas bone ekkoni novajn homojn kaj speciale denaskulojn. En grandaj junularaj renkontiĝoj, ekzemple en IJK, ĉiam troviĝas ĉirkaŭ 20 junaj denaskuloj kaj estas ĉiam interese paroli kun aliaj denaskuloj. Ĉar ni ofte parolis pri komunaj spertoj, la sperto en la familio, la sperto kun amikoj kaj tiel plu. La komunaj paroltemoj inter denaskuloj estas multaj. Ekzemple, kiel la lingvo evoluiĝas hejme. Ĉar oni ofte uzas iujn miksaĵojn el aliaj lingvoj. En mia infaneco, mi uzis ofte iujn Esperantajn vortojn se mi ne scias la polajn. Ĉar mia patrino parolas ambaŭ la polan kaj Esperanton kaj ŝi komprenis pri kio temis. Kiel lingvisto, ŝi ankaŭ verkis raportojn en sia libro pri la lingva evoluo de ni, infanoj. La denaskuloj de tempo al tempo renkontas problemojn. Ekzemple, se oni demandas nin kial vi metas tiun vorton post tio en Esperanto kaj kial vi tiamaniere uzas la lingvon, ni ne povas tute bone respondi, ĉar ni ne vere lernis la lingvon. Laŭ mia opinio, denaskuloj fakte ne havas lingvan avantaĝon. Ĉar ankaŭ homoj, kiuj poste lernis Esperanton tute samnivele eĉ plibone parolas ol iuj denaskuloj. Tio ja estas la celo de Esperanto.





## Tra la Mondo – 世界各地

### La UK en 2012 okazos en Hanojo

Laŭ gazetara komuniko de UEA la 97-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Hanojo en 2012. Tiun ĉi decidon faris la estraro de UEA en sia plena konsisto en la Centra Oficejo ekde la 10-a ĝis la 12-a de januaro. La Esperanto-movado de Vjetnamio havas jam longan historion, sed la Universalan Kongreson ĝi gastigos por la unua fojo.

### La 76-a Internacia Kongreso de Blinduloj-Esperantistoj okazos en Vieno

Laŭ informo de Marija kaj Branko Repec el Kroatio, la 76-a Internacia Kongreso de Blinduloj-Esperantistoj okazos en Vieno, Aŭstrio, de la 10-a ĝis la 15-a de julio ĉi-jare. La 75-a IKBE okazis julie de la pasinta jaro en pola urbo Muszyna kun preskaŭ cent partoprenintoj.

### Invito al al 77-a Kongreso de Esperanto

Laŭ informo de Itala E-Federacio, celebre al la centjariĝo de itala

Esperanto-movado, la 77-a Itala Kongreso de Esperanto okazos de la 21-a ĝis la 28-a de aŭgusto, 2010, en la bela kaj fama ferioloko Linjano Orsbla, mezvoje inter Venecio kaj Triesto, nordorienta Italio. La ĉeftemo de la Kongreso: “Lingvaj rajtoj en la Eŭropa multkultura socio.”

### La nova Zamenhof-statuo en Herzberg



En la 15-a de decembro (ĝuste je la 150-a naskiĝdatreveno de la iniciatoro de Esperanto) la urbestro de Herzberg am Harz Gerhard Walter kune kun Petro Zilvar inaŭguris la belan Zamenhof-monumenton apud la t.n. akvorado kaj piediranta zono de Herzberg. La postamento estas el nigra marmoro kaj la Zamenhof-busto el blanka marmoro. Ĉinaj artistoj kreis la eksterordinan memorigilon pri

la kreinto de Esperanto. Esperantistoj el ĉirkaŭ 15 landoj helpas ĉe la kunfinancado de la grava memorejo.

Poste oni festis en la kavalira salono de la kastelo Herzberg la rondciferan naskiĝdat-revenon de d-rPost la oficiala inaŭguro okazos la ekspozicio vizitebla de januaro ĝis aprilo 2010.

*Petro kaj Zsofia*

### Esperanto-kurso en Ŝanhajo por la Monda Ekspozicio



Antaŭvespere de 100 tagoj de la inaŭguro de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio funkcias Esperanto-kurso en Ŝanhajo. La instruisto estas prezidanto de Sanhaja E-Asocio Wang Minhao. La lernantoj liveros servon al tutmondaj esperantistoj dum la Ekspozicio.

*Wang Minhao*

# Mikronovelo – 微型小说

## NE TIA "MATURECO"



La mondo ŝajnas malvasta, se la sorto regas.

Li pensis, ke diplomite el universitato li ne revidos ŝin. Ekster sia atendo, ĉi-foje, farante ofican vojaĝon al Pekino, li hazarde renkontiĝis, pli precize dirite, koliziis, brusto-al-bruste, kun ŝi, ĉe la portalo de la magazena domego en Wangfujing. Sen sekunda ekarto, li levis vatitan kurtenon por eniĝi, dum ŝi, sur la interna flanko, same agis por eliĝi! Jam 10 jarojn, ŝi iom grasiĝis, tamen ŝia dolĉa krio faris, ke li tuj rekonis ŝin. Siaflanke, ankaŭ ŝi, kiu prompte kunigis sakojn kaj pakojn al unu mano por malplenigi la alian kaj etendi ĝin al li. Firme kunpremiĝis 2 manoj, ŝia kaj lia; sin fiksas 4 okuloj, la ŝiaj al la liaj; sekvis rideto, kaj ĉio jam esprimiĝis, ĉu saluto, ĉu io alia.

Ambaŭ kune sin direktis al proksima kafejo. Eniĝinte ili elektis angulon kaj mendis 2 tasojn da kafo. Sidante ili denove rigardis unu la alian kaj ridetis, anstataŭ paroli.

Sincere dirite, antaŭ 10 jaroj, en la universitato, li silente amis ŝin. Ŝi estis ne nur bela, sed ankaŭ altapuenta en la lernado kaj surprize honesta kaj malkaŝema. Ŝi ĉiam rekte esprimis sian opinion kontraŭ io ajn nejusta, sen distingi objekton, okazon kaj timi sekvon. Moderna modelino aminda kaj laŭnorma, prikantata de verkistoj – ja

tia ŝi! Tamen li perceptis ŝin nematura kaj imagis sennombrajn problemojn en eventuala kunvivado, tial post ripetita konsiderado li subpremis sian ideon fari am-atakon. Kvazaŭ kiel de li antaŭvidite, laŭ siaj sukceso en lernado kaj morala kvalito ŝi povus, kiel li, esti sendita al explorejo en provinca ĉefurbo; sed ĝuste antaŭ diplomado ŝi aŭdacis fari refuton kontraŭ dekanon por iu tute nekoncerna, fine oni sendis ŝin al malgranda fabriko, ĉiam povanta bankroti, en urbedo de malproksima ĉelandolima provinco. Ho ve! Tiam li suspiris, sin turninte al ŝi. "Ve, kiam vi maturiĝos? Kial ĝuste en la kriza momento vi ofendis la dekanon?" Sed ŝi rondigis la okulojn kaj, nenion komprenante, demandis, "Ĉu?"

Li iom kirlis la kafon kaj mezuris ŝin per rigardo. "La lastajn jarojn vi tre bone pasigis?"

Ŝi ridetis. "Rigardu mian aspekton! Ĉu bone aŭ ne?"

Efektive, ŝia vizaĝo estis roza kaj riĉ-impresa; ŝiaj vestoj, el altaklasa ŝtofo kaj altanivela metio, tre bone sidis, kun freŝeco, senĝeneco kaj modeco. Ĉio atestis, ke ŝia vivo estas riĉa kaj trankviliga.

Li kapjesis. "Mi ne atendis, ke via karaktero povis porti al vi agrablan printempan venton."

Ŝi ridis. La rido entenis amaron. "Mi memoris vian sinceran admonon kaj maturiĝis..."

Surprizo al li. "..."

Ŝi daŭrigis, ironie al si, "Mi ellernis trakti diversajn rilatojn, diri elektitajn vortojn, skrupule paroli, atenteme agi kaj konsideri sekvon antaŭ ol ion fari aŭ diri, tial ĉiuj ekŝatis min. Mi edziniĝis al vickomisaro kaj fariĝis vicestrino de subprovinca industria buroo. Kaj ĉi-foje mi venis al Pekino por ĉeesti al konferenco de... kiel vi diris, favorate de printempa vento."

Antaŭ 10 jaroj, li esperis, ke ŝi estos komprenema. Ĉi-foje, kiam li vidis ŝin tia, io ekondis en lia koro. Sed kio? Li ne povis klarigi al si.

Iom svinginte la hararon, ŝi ekfiksas rigardon al li. "Nun mi estas kiel gemo multakolora kaj glata, tial plaĉas al ĉiuj. Ĉu tio ne estas matureco de vi esperita?"

Li povis nur balbuti. "E... eble..."

Glimis ŝiaj okuloj, forsvenis ŝia rideto, aperis tristo en pezeco. "Mi jam maturas!!"

Li silentis.

Fridiĝis la du taso da kafo. Li kaj ŝi statuis, kiam koloraj lampoj petole kalejdoskopis ĉirkaŭ ili.

### Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renoviĝas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



Esperanto service, CRI-36

China Radio International

P.O. Box 4216 Beijing, China 100040

Tel: +8610 68891940

+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

Retadreso: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉefredaktoro: Zhao Jianping

Redaktoroj: Wang Fang

Zhan Xuede

Xiao Henggang